

iun respondecon por la tuta klaso. La sola kolektivo, kun kiu la infano sentas solidarecon, estas la familio. Sed post du-tri jaroj oni povas rimarki certan liberiĝon for de la gepatroj kaj novajn rilatojn al la kamaradoj. La antaŭa aŭtoritata moralo cedas al moralo de reciprokeco. La sociala evoluado devas adaptiĝi al tiu ŝanĝo. La instruado pri la hejma regiono nun estas dividata en tri fakojn, nome, historion, geografion kaj naturscion. Per ili estas eble stimuli la socialan tendencon de la infanoj; en la historio per la ekzemploj de socie agantaj kaj kreantaj pioniroj, en la geografio per aktualigo de samtempaj sociaj problemoj, en la naturscio per atentigo pri la neceso de kunlaboro kiel vivkondiĉo en la mondo de la naturo k.t.p.

En la aĝo de 10 ĝis 12 jaroj la intereso por sociaj demandoj ordinare konsiderinde vigliĝas, kaj estas grave evoluigi la novajn impulsojn en kiel eble plej multaj situacioj. Nur teoria instruado pri socia vivado ne sufiĉas; ĝin devas kompletigi diversaj aranĝoj por lasi respondecon kaj decidon al la lernantoj mem. Multloke oni provis realigi tiun programon pri enkonduko de demokratio en la lernejon per certagrada memregado de la disĉiploj. Konsilantaro konsistanta el lernantoj ordinare igas la junulojn konsciaj pri iliaj propraj problemoj kaj pri la neceso ataki ilin serioze kaj malegoisme. Kiam lernanto spertas, ke liaj vortoj kaj agoj havas konsekvencojn ne nur por li mem sed ankaŭ por liaj kamaradoj, en lia interno vekiĝas socia konscio, kaj ĝin nia hodiaŭa mondo tre urĝe bezonas. Junulo, kiu mem estis membro de tiaj konsilantaroj, diris: *Post la lerneja tempo estas necese fari decidojn, ofte decidojn kiuj koncernas nian tutan vivon. Tio, kion la lernantoj lernis pri algebro, la gepatra lingvo kaj aliaj temoj, ne helpas ilin fari saĝajn decidojn. Estas tio, kion ili lernis pri la socio mem, kio havos por ili la plej grandan utilon. Ili pli facile povos elekti siajn vidpunktojn kaj poziciojn, se ili lernis pensi kaj agi memstare kaj kunlabori kun aliaj por la komuna bono.*

La aktiveco akcentiĝas en la aĝo de 10 ĝis 12 jaroj kaj atingas sian kulminon en la t.n. heroa aĝo. Je tiu impresiĝema aĝo aŭtoritateca kaj diktatoreca instruado povas kaŭzis grandan difekton. Same grave estas, ke la gepatroj dum la puberiĝaj jaroj ricevas prudentan gvidadon kaj moderan memregadon. Neniam estas pli grave ol je tiu aĝo atenti, ke la celo de la lernejo ne estas krei amas-homojn sen individueco, sed vere demokratiajn individuojn. Sed la ĉefa premiso por la demokratia edukado estas, ke la lernantoj vivas kaj kondutas demokrate en la lernejo. Demokratia vivkoncepto kaj demokratia kompetenteco ne estas rezultoj de fikтивaj situacioj, sed de aktiva partoprenado en la ĉiutaga laboro de lernejo, kie la administrado, la instruado kaj la tuta organizo funkcias laŭ demokratiaj principoj. Nur se la lernejo ĉiurilate respektas tiujn principojn, ĝi povas krei en siaj disĉiploj respekton kaj sindonemon por la demokratio.

Fine mi dezirus atentigi pri speciala problemo — aŭ pli ĝuste komplekso de problemoj — kiu devas esti konstanta elemento de la demokratia edukado.

Mi aludas la internacian pensmanieron, kiu ankoraŭ ne trafermentigis la homaron. Estas tre dezirinde, aranĝi interŝanĝon, trans la landlimojn, de instruistoj kaj lernantoj, fondi internaciajn edukejojn, instrui pri la Unuiĝintaj Nacioj, prilabori jam ekzistantajn kaj verki novajn lernolibrojn en internacia spirito k.t.p. Ni ankoraŭ ne forgesis, kien kondukas primitiva nacia egoismo, kiam ĝi estas aplikata en la rilatoj inter la nacioj. Mi tute konscie diras *primitiva* ĉar ĝuste ĉe la t.n. primitivaj popoloj oni plej pure kaj konsekvence renkontas la kredon pri la supereco de la propra gento aŭ raso. Kiam ekzemple la unuaj eŭropanoj atingis Okcident-Hindujon kaj demandis la sovaĝajn karaibojn, al kiu tribo ili apartenas, ili respondis: *Ni estas la solaj homoj*. En la sama maniero la aziaj tunguzoj kaj skandinavaj laponoj nomas sin tute simple *la homoj* en siaj respektivaj lingvoj. Kaj la eskimoj laŭdire kredas, ke la eŭropanoj vizitas ilin por lerni kulturon kaj bonajn morojn. La plej alta laŭdo, kiun eskimo povas doni al alia homo, estas ke tiu estas aŭ baldaŭ estos *vera eskimo*. Kiel ni scias, ne estus malfacile trovi ekzemplon pri simila superstiĉo en pli malfrua tempo kaj en pli mallonga geografia distanco.

Ni Esperantistoj havas speciale fortan kialon kontraŭagi tiajn esprimojn de nacia memsufiĉeco, sed ni ne havas iun ekskluzivan rajton pri tiu agado. Estas la nerefutebla rajto — kaj devo — de ĉiu homo labori por tutmonda interkompreno, kaj la plej efika metodo sendube estas — demokratia edukado.

## PRINCIPOJ PRI LINGVON GVIDADO

408.92

far D-ro Inĝ. G. HAMMING

Sendube redaktantoj povas influi la evoluon de la lingvo. Tial ŝajnas al mi ĝuste, doni miajn ideojn pri tiu temo. Tio faciligas la diskutojn pri lingvon uzo.

Esp-o fontas el la lasta parto de la 19a jarcento. Tiam estis granda distanco inter scienculoj kaj laikoj. La scienco ĵus trovis multajn novajn konceptojn; ilin la laika publiko ankoraŭ ne akceptis. La scienculoj kredis ke ilia scienca laboro estas preskaŭ preta. Ankoraŭ la precizan valoron de kelkaj konstantoj oni volis mezuri, kelkajn detalojn oni sciis esploraĵoj, — sed la ĉefa tasko estis liberigi la laikojn el la ĉenoj de la tradiciaj sensencaĵoj. Mispensigaj kaj konfuzaj estis vortoj kiaj: sorĉi, koboldo, diablo, infero, anĝelo, ombrulo (postmorta aperanto), kaj multaj aliaj.

La konceptoj fariĝadis klaraj kaj definitivaj. Jam sufiĉus se oni trovis definitivan klaran lingvon por teni tiujn konceptojn klarajn kaj malteni la tradician balaston.

El tiu ĝenerala ideo fontis du sintenoj: Se jam eblas supervidi la kompletan nociaron, estas necese konstrui la novan lingvon tre perfekta. Etaj



mankoj ja ekzistos kaj ĝenados dum jarmiloj. Komencan haoson oni preferu ol balasteton eternan. Tiu sinteno gvidas la eternajn plibonigantojn. Ne estas hazardo ke *Couturat* ne nur ludis gravan rolon en la Ido-afero, sed ankaŭ grave kontribuis al la logistiko, la logiko persimbola. La historio de *Ido* pruvis ke oni ne povas konstrui lingvon sur ĉi tiu bazo. La nociaro ne estas tiom klara kaj tiom definitiva kiom oni kredis. Ankaŭ la lingvo ne povas esti tro definitiva.

Sed alia sinteno fontas el la sama ideo. Se la nociaro definitiva estas konata, eblas konstrui la definitivon ostaron de la nova lingvo. Oni do povas eternigi (oficialigi) tiun ostaran parton. Jen la oficiala vidpunkto de *Esp-anoj*.

Ne nur la *Esp-ismo* estiĝis, sed ankaŭ la socialismo. En tiu ismo vivis la opinio ke la entreprenoj grandparte estu posedaĵo de la ŝtato. Fakte ili opiniis ke la bonvolaj kaj kapablaj personoj estu ŝtatgvidantoj. Mispense ili el tio konkludis ke la elektotaj ŝtatgvidantoj sendube pruvigis kapablaj kaj bonvolaj. *Zamenhof* opiniis ke bonvolaj kapablaj homoj gvidu la evoluon de la lingvo, kaj el tio konkludis ke Akademianoj (Lingva-Komitatoj) aŭtomate kapablas por siaj taskoj. Ĉi-rilate *Zamenhof* estis iom naiva. Li ne sufiĉe vidis sian geniecon kaj mise opiniis eble, ke li baldaŭ forlasu sian gvidan pozicion. La taskon gvidi lingvon *Zamenhof* taksis tro facila, ĉar lingvo estas pli evoluema ol li atendis.

Ja la baza ideo pri definitiva nociaro pruvigis malĝusta. En nia jarcento la sciencoj multe progresis, ofte ili rekonstruis sian bazon mem. Post kiam mi trapasis la inĝenieran ekzamenon pasis 12 jaroj. Post tio la bazaj ideoj tiom ŝanĝiĝis, ke mi ree sentas min laiko. La ekonomion ekz. mi devas studi kiel liceano, kvankam ĝi estis unu el miaj studfakoj!

Tiu rapidega progreso de la scienco kaŭzadas grandan lingvan haoson. Kiel ekzemplon mi menciu, ke en la prelego de Prof. *H. Sirk* (*Sc. Rev.* 6, 91) troviĝas la terminoj: *elektromagnetaj ondoj*, *katodradioj*, *kanalradioj*, *elektronoj*, *heliumjonoj*, *β-radioj*, *γ-radioj*, *α-radioj* por indiki tri nociojn. Mi ne serĉis esceptan okazon. Fakte *Esperanto ne estas unu lingvo sed miksaĵo el du preskaŭlingvoj*. Komparu:

abituriento	preskaŭstudento
biblioteko	librar(ej)o
filantropo	bonfarulo
mizantropo	homfuĝulo
redaktoro	redaktanto, redaktisto
redakcio	redaktantaro
administraciisto	oficisto, estro
administracii	ofici, estri
estrado	podio

Estas tre facile longigi la liston. Kelkajn kromajn ekzemplojn vi trovas en

la recenzo pri „*La imitado de Kristo*”. Unua nia tasko estas fari unu racian lingvon el tiuj du aŭ tri preskaŭaj. Versajne duono el niaj oficialaj radikoj pruvigis *evitenda ĉar nenecesa*.

Precizigi miajn opiniojn mi volas. Kun la rapidega evoluo de la sciencoj rapide kreskas la lingvoj. Novan terminon faranto estas tiu sciencisto, kiu konceptis la nocion. Li ja estas la unua kiu uzas la terminon; la unua devas fari ĝin, per elekto aŭ kreo. Ordigante novajn spertojn aŭ jamajn nociojn li trovas nocion pli bazan, kaj donas al ĝi terminon ĉu taŭgan, ĉu konfuzan. Kiuj studis lian publicaĵon, komprenas la terminon kaj uzadas ĝin; alij plen- das pri nekomprenebla lingvo. Pri sama temo ofte laboras kelkaj sciencistoj kreadante terminojn, kiuj parte havas la saman signifon aŭ parencon. Parte ili havas nocian koheron sed ne lingvan, ekz. ornitologio — birdo, telefono — voĉo. Aliaj havas lingvan koheron sed ne nocian, ekz. telefono — fono, elektromagneto — elektromagneta kampo (la kampo de elektromagneto estas magneta kampo se la elektra kurento ne ŝanĝiĝas; elektromagneta kampo estas kampo samtempe elektra kaj magneta).

Ofte post kelkaj jaroj aperas ordigaj manlibroj pri la temo, kiuj pli malpli sistemigas la terminaron, almenaŭ fiksas ĝin.

Kutime la novaj terminoj estas la samaj aŭ tre parencaj en la okcidentaj lingvoj. Ili do apenaŭ koheras kun la „pura”, la „baza” parto de tiuj lingvoj malsamaj.

Tamen kelkaj okcidentaj lingvoj daŭre purigadas sin. Tiel laŭ *Nederlanda* ekzemplo ni povus paroli en *Esp-o* pri malmiskono (matematiko), disigkono (hemio), naturkono (fiziko), regnomastrumkono (ekonomio), saĝdeziro (filozofio). Mi ne volas pretendi ke la *Nederlanda* ekzemplo ĉiam estas imitinda; sed ĝi bone vidigas kiel oni povas klopodi teni la lingvan koheron. La *Nederlanda* lingvo ne ĉiam sukcesas, sendube la tasko estas pli facila por *Esp-o*. Se oni ne purigadas tiele la lingvon, oni baldaŭ ne plu havas unu lingvon sed miksaĵon el du aŭ pli. Vidu ekz.

<i>cheval</i>	<i>hippique</i>
<i>eau</i>	<i>aquatique</i>
<i>dog</i>	<i>canine</i>
<i>help</i>	<i>auxiliary</i>

Per ekzemploj mi jam vidigis ke ankaŭ *Esperanto* estas tia lingvomiksaĵo. Per ĉi termino mi ne memorigas ke nia vortprovizo venas el multaj lingvoj, tio ne gravas. Karakteriza por lingvomiksaĵo estas ke la vortoj ne koheras.

Tiam ĉi neniu sciencisto posedas sisteman koheran lingvon per kiu li povus pensi, do en lia kapo troviĝas nenecesa haoso. *S-ro Wajsbium* (*Sc. Rev.* 6, 103) plendas ke la *Esp-anoj* povas oferti nenion specialan al la sciencistoj; sed ankaŭ laŭ lia propono ni ofertu nur bonvolon kaj laboremon. Principe lia



servo povus uzi la Anglan lingvon; kaj certe tia servo fariĝos Anglalingva se la servo pruviĝos utila. Se la servo mem sukcesos, Esp-o fiaskos en ĝi, ĉar ĝi ne ludas esencan rolon. S-ro Wajsbloom pravas ke ni devas oferti ion specialan; fakte ni povas oferti ion tre specialan, nome unu koheran penslingvon. Se iu volas atingi klaran lingvon, li devas agnoski la ideon pri sinteza normlingvo. Klaran penslingvon ni povas oferti, tamen ni ankoraŭ devas fari ĝin el nia oficiala lingvomiksaĵo. Jen nia tasko.

Jam longe estas du tendencoj en la sintezaj lingvoj. Unu preferas la skemismon, alia la naturalismon. La skemismo serĉas unu lingvon, la naturalismo donas miksaĵon el minimume du. Ja la internacia vortprovizo venas el la Greka kaj la Latina; pri *insektoj* studas *entomologoj* ĉar laŭ internacia kutimo oni ne rajtas fari kunmetaĵon el la Latina *insekto* kaj la Greka *logio*. Tiele oni ne povas eviti haoson.

Se du tendencoj tiom longe ekzistadas, havas ambaŭ siajn avantaĝojn. Ankaŭ la naturalismo havas ĝin. Por sciencisto estas pli facile uzi Esp-on se li rajtas uzi la internaciajn vortojn senripense. Se estus postulate ke artikolon verkanto konsideru ĉiun vorton ĝisfunde, neniu povus labori. Fakte do oni ne povas eviti naturalisman vortuzon. Verdire oni ankaŭ opinias ke la propagando inter sciencistoj pli bone sukcesos se la lingvo aspektas naturalisma. Tion mi ne kredas, ĉar ni tiele gajnas nur unutaĝulojn. Tradiciemaj sciencistoj preferas nacian lingvon, kaj skememaj sciencistoj perdiĝas pro la naturalisma haoso. Cetere la naturalismo estas tro kosta kaptilo; ni ja oferas nian klaran facilan lingvon klerigan.

Esence estas Esp-o la lingvo internacia ankaŭ por la maleminentuloj, la bazularo. Kion naturalismo signifas por ili? Ni pensu pri Japanaj laboristoj. Ili ne jam konas la internaciaĵojn. Al ili la naturalismo donas balaston. La listo de Broadribb (Sc. Rev. 6, 81) estas instrua. Esp-o havas kelkmil radikojn; se ni tenus nian lingvon skema, ni verŝajne duonigus la malfacilon de Esp-o por la bazularo. Kaj ni instigus la Esp-anojn pensi pli sendepende de la naciaj aprioraĵoj. Ĝuste tio estas necesa por atingi internacian komprenon.

Tiu penso validas ne nur por la bazuloj. La junuloj, la liceanoj, la studentoj devas lerni pensi per orda nociaro. Ili fakte devas aranĝi sian mensan enhavon. Ankaŭ al ili la lingvomiksaĵo kaŭzas balaston. Se iam oni lernas Esp-on en la liceoj, per ĝi oni trovu ordan nociaron. Ĝi estu la amata *penslingvo*. Nur la skemismo donas sanan bazon. Halloran<sup>1)</sup> trovis ke Esp-o faciligas la instruon pri la Franca lingvo: malpli inteligentaj lernantoj pli facile lernis Esp-on kaj la Francan ol nur la Francan senplue en la sama tempo. La diferenco estis plej granda ĉe tiuj lernantoj kiuj havis nesufiĉan

<sup>1)</sup> Vidu: J. H. Halloran. *A four year experiment in Esperanto as an introduction to French*, *The British Journal of Educational Psychology* 22 200 [1952].

vortkapablon, kiuj perdis la vojon en la abunda vortprovizo naturalisma de la Angla lingvo. Kredeble ĉi tiuj geknaboj lernis nur la skemisman parton de Esp-o. Skemisma Esp-o ordigas la pensrimedojn kaj instigas la inteligenton, la pensivon kaj sentivon.

Ĉu do la naturalismo ne havas taskon? Tamen. Imagu urbeton, kie ĉiu parolas nur Esp-on. En la liceo oni lernas ordigi siajn ideojn per orda skema lingvo. Oni ankaŭ lernas kelkajn fremdajn lingvojn. Ankaŭ universitato estas en la urbo. Tie oni studas ĉiujn fakojn. La profesoroj malmultaj klopodadas ordigi la internacian fluon de novaj ideoj per sistema lingvo. Sed la laboro kreskas super iliajn kapojn. Kion ili faru? Ĉu ili instruu nur pri la ordigitaj konceptoj? Prefere donu ili ĉiujn bonajn ideojn haose. Pri tiuj temoj ili parolos per lingvo naturalisma.

Ĉu do la skemismo maleblas? Tamen ne. Tuj kiam troviĝas grupo laboranta per Esp-o pri iu ajn temo, doniĝas la eblo sistemigi la lingvuzon. Tiam ĉi en Esp-ujo ne estas sufiĉo da sciencistoj por plenumi la tutan laboron, sed ĉiu kapablulo povas labori pri sia propra fako.

Esp-o estas lingvo internacia, ankaŭ por la bazularo. La bazularo formas la bazon de la socio, ĝia lingvo estas la bazo de la tuta lingvo. Gvidi nian sciencan lingvon ni povas nur se ni demandas al ni, kiel ni povas plej facile diri al tiuj bazuloj nian scion. En Esp-ujo mankas la liceo, la *kleriga movado*. Unua nia scienca tasko estas krei licean libraron; do aron da libroj kaj artikoloj kiuj instruas pri la hodiaŭaj sciencoj tiujn personojn, kiuj trapasis nur la bazan lernejon. Por fanfaroni ni saltis de la baza al la universitata nivelo; ni forgesis ke speciale la liceo havas la taskon elserĉi la ideojn kun ĝenerala gravo, kaj ordigi ĝuste tiujn.

Por klerigo ne necesas uzi multon da vortoj por diri malmulton. Gravus uzi nur necesajn vortojn, vidigi la rilatojn inter la koncernaj nocioj. En Esp-ujo ankaŭ ne necesas doni la pruvojn subtenantajn la asertaĵojn. Ja ofte oni scias la faktojn per sia nacia lingvo. Ĉefe gravas la interna ordo, kiun ni povas doni se ni kuraĝas.

Sciencistoj konas eksaktulan lingvon; multaj nocioj perdis la aktualon dum ilia scienca vivo. Sed tio ne estas motivo igi studentojn lerni tiujn eksaĵojn. Ja ekzistas manlibroj por ke oni ne bezonu legi artikolojn malnovajn. Se oni povus instigi la aŭtorojn eviti eksajn formojn, oni evitus ne malmulton da balasto. Ekz. jam tre longe la ĝusta internacia formo estas *glicerolo*; nenial ni rajtas uzi la eksan formon *glicerino*. Pli gravas ke *glicerolo* estas oficiala laŭ la internaciaj ĥemiaj organizaĵoj ol ke *glicerino* estas oficiala laŭ la Esp-a movado. Niaj oficialaj vortoj povas fariĝi malpermesendaj.

Konkludu ni ke la naturalismo estas rimedo por uzi la internacian konon ne digestitan. Por klare pensi kaj pensigi, por klerigi la bazularon, la junularon kaj nin mem, necesas ordigi kaj sistemigi tiun konon, necesas ade kribri la terminojn, ade difini iliajn signifojn, ade eksigi malaktualajn formojn. Ĉe ĉi laboro gvidi povas nur la skemismo.



Sendube la lerneblo de Esp-o iom malkreskos se lingvo iras sian propran vojon. Tio ne gravas, ĉar ĝuste tiu propra vojo vekos interesigon. Se ni deziras ke Esp-o estu laŭeble simila al aliaj lingvoj laŭ nociara konsisto, ni maldeziras oferti al la scienculoj iun sciencaĵon specialan. Se ni atingos per nia lingvo ion specialan, postulos tiu atingajo specialan studon se oni volos koni ĝin. Ĉiun gravan atingajojn oni devas studi. *Lerni Esp-on estu scienca, sinkleriga laboro; koni Esp-on estu scienca atingajo.* Atinginte tion ni havos ion ofertindan por scienculoj kaj aliaj.

Cetere oni ne tro timu ke Esp-o fariĝos malpli facila. Estas multaj oficialaj radikoj kiujn ni povas anstataŭigi per kunmetaĵo same eleganta, ne pli longa. Evitante tiajn formojn ni perdas nenion krom ĝenon. Sed ankaŭ kelkaj novaj afiksoj ne malfaciligas la lingvon se ni per tiuj eksigas kelkdek aŭ kelkcent malnovajn formojn.

Kutime redaktantoj de sciencaj revuoj zorgas ke nova artikolo konsideras la enhavon de antaŭaj pri la sama temo. La centra tasko de nia Scienca Revuo estu, kapti la veron el ĉiuj fakoj per plej klara kaj plej simpla lingvo. Ni rajtas peti ke la aŭtoroj uzu novtrovitajn klarajn formojn, ke ili evitu necesajn terminojn, kiuj pruvigis evitindaj. Ĉu ili oficialas ne gravas. La scienco serĉas ne oficialon, sed veron.

Dum la venonta jarkvino estos nia ĉefa tasko science senbalastigi Plenan Vortaron, forigante pli ol duonon el ĝiaj radikoj. Tial mi pleje ŝatas tiujn artikolojn kiuj instruas anstataŭigi grupon da radikoj per klaraj elegantaj kunmetaĵoj, se necese pere de nova afikso. Mi jam donis kelkajn ekzemplojn sur p. 104.

Ĉe tia laboro oni bezonas kelkajn regulojn. Oni konsideru jenajn:

1e. Per mallongaj radikoj oni plej facile kunmetas; oni do evitu longajn radikojn. Pli ol tri silabojn havanta radiko ofte estas malagrabra. Komparu: *malspontanea knabo* kun *malsponta knabo*. Ni ankaŭ atentu pri tio ke longajn radikojn oni ne facile elparolas laŭ la regulo ke oni diru ĉiujn literojn. Anstataŭ *diferencialo* oni diras *difrencjalo* aŭ ion. Nu, en Esp-o ni serĉu direblajn vortojn. Precizigante nian unuan regulon, ni do preferas ĝenerale uzi radikojn du- aŭ trisilabajn; unusilabajn radikojn ni uzu kaj rezervu por tiuj nocioj kiujn oni ofte bezonas en kunmetaĵoj, plejofte do por afiksoj.

2e. Oni ne uzu novan terminon, se jam ekzistas alia taŭga termino por la sama nocio.

3e. Se ial ajn kunekzistas du terminoj samsignifaj, la plej aĝa estas preferinda. Tial „tangenso” estas la preferinda formo (vidu: C. M. Bean: Matematika terminaro).

4e. Oni rajtas anstataŭigi malnovan terminon, se ĝi kaŭzas konfuzon aŭ estas malbela. Pro la malbela oni mallongigis multeton da radikoj en Esp-o, ekz. *abol(ici)i*, *apel(ac(i))i*. Ĉi tiu regulo estas iom danĝera; tamen ĝi estas necesa. Neniel povas ni malebligi ke iu uzos novan terminon se alia mal-

plaĉas al li pro iu ajn kaŭzo. Pri lingvuzo ne eblas deviga ordono! Ni jes povas rifuzi mem uzi la novan vorton kaj uzadi la malnovan. Necesas kompromiso inter ambaŭ tendencoj; tial mi konsilas anstataŭigi malnovan terminon nur se oni ĉedonas konvinkivan motivon. Aliukaze neniu sekvos la ekzemplon.

5e. Longajn kunmetaĵojn oni rajtas anstataŭigi per mallonga radiko. Radiko kiu estas same longa aŭ pli longa ol samsignifa kunmetaĵo, nepre estas evitinda. Ekz. *biblioteko* estis pli longa vorto ol *librarejo*. La vorto ne havas ian utilon, do estas evitinda; ĝi estas nur balasto. Ho, kompatinda Japana laboristo, ne metu biblion en la teknon!

6e. Se oni uzas novvorton ne ĝenerale konatan, oni indiku ĝian signifon per literaturoloko, se la legontoj facile povas akiri tiun literaturaĵon. Aliukaze oni donu klarigan noton (kaj la literaturmencion).

7e. Se iu proponis novan vorton, ĉiu rajtas uzi ĝin se li opinias la vorton utila. Ĉi tiu regulo ne bezonas klarigon: se oni rajtas mem fari vorton oni nepre rajtas uzi vorton far aliulo. Tamen necesas mencii la regulon. Mi havas la impreson, ke oni ne kuraĝas uzi proponitajn vortojn ĝis iu aŭtoritato pravigis la vorton: kaj neniu volas aprobi vorton ĝis oni ĝenerale uzas ĝin. Scienculoj, ni sciu ke novaj sciencaj terminoj ne bezonas aprobon, nur scienca ĝuston; esence ĝusto sufiĉas por ĉiuj vortoj.

8e. Se oni volas distingi inter du nocioj, inter kiuj oni nacilingve ne distingas, oni prenu la terminojn el malsimilaj lingvoj. Tial *krafto* estas pli bona vorto ol *forso* (vidu: C. B. Bean: Matematika terminaro). Oni pensu ekz. pri preseraroj, misaŭdoj kaj misdiroj.

Ĝis nun mi nur momenton aludis je la Akademio. La indikitaj reguloj iom forprenas ĝian taskon. Tamen restas kelkaj gravaj taskoj:

Ofte oni ne scias kiu termino estas la plej aĝa: ĉu strando, ĉu plaĝo. En tiaj kazoj la unuopuloj ne povas esplori tion. Tial nia dua regulo ne kompletas. Pli gravas mencio en vortaro ol troviĝo en iu libro aŭ artikolo. Ni do konstata ke en kazo de dubo oni preferu sekvi la indikon far vortaro. Sed eble la vortaroj ne harmonias, eble troviĝas forta grupo kiu ne volas sekvi la vortarojn. En tiaj okazoj la Akademio havas taskon; per oficialigo ĝi povas subteni unu el la konkurencaj vortoj. Oficiala radiko estas preferenda ol neoficiala.

Klare ni konsciu ke oficialigo ne estas instigo uzi la vorton. Esence oficialigo estas *kondiĉa* kvalito; ekz.: se oni volas indiki librarejon per sendependa radiko, oni uzu la vorton *biblioteko* (mi jam vidigis ke oni ne volu tion). Se oni volas indiki bantaŭgan marbordon per unu termino, oni uzu *strando*. La ĉefa tasko de la Akademio do ne estas la enkonduko de vortoj, sed la ĉesigo de necertoj pri la ĝusta termino por indiki jam donitan nocion.

Sed ankaŭ estas alia tasko por la Akademio. La kvara regulo konstata



ke oni jen kaj jen volas anstataŭigi jaman vorton pro malbela aŭ alia kaŭzo. La scienco progresas, la gustoj evoluas, la sperto riĉiĝas. Se la oficiala lingvo ne stagnu, ni devas trovi eblon modernigi la vortoprovizion. Necesas ke la Akademio kuraĝu evitendigi oficialan vorton. Por tiu celo necesas ke ĝi oficialigu vortojn samsignifajn. Tiam okazon ni havus se ĝi oficialigus la vorton *sponta* (samsignifa kun *spontanea*). Poste la Akademio povus esprimi sian preferon por ekz. *sponta*. Sed la alia vorto restus oficiala, t.e. se iu ne volas sekvi la preferon de la Akademio li prefere uzu la alian vorton; sed restas lia rajto uzi trian formon (oni ja ne povas malebligi tion).

Multaj timas ke la unueco de Esp-o rompiĝos se ni tiele gvidas la lingvoevoluo. Malprave. Se vere Esp-o estas tiom perfekta kiom la fanfaronuloj diras, oni ja povas plibonigi nenion! Neniu aŭ nur tre malmultaj imitos ŝanĝaĉojn.

Se malgraŭ ĉio multo pruviĝas bonigebla, estos granda paŝo antaŭen se ni vere faros tion. Lerta propagando ne povas atingi ke multaj sciencistoj restados obeeme fidelaj, se ili vidas multajn malbonaĵojn.

Bonigemo povas esti danĝera, nome se oni volas ŝanĝi lingvon devige, se oni volas diri: ek de nun oni ne plu rajtas uzi la malnovan formon ĉar la nova estas pli bona. En lingvoj oni ne povas devigi. Nepre necesas ke oni novigu, sen tio la scienco ne povas progresi. Same necesas respekto je la tradicio, sen tio socio ne povas ekzisti. Ni rajtas novigi, sed en kazoj de dubo ni konservu la malnovaĵon. Kaj precipe ni lasu liberon.

408.92 : 413

### PRI „NEOFICIALAJ VORTOJ EN NIA LINGVO”

de DONALD R. BROADRIBB

Mi deziras atentigi pri kelkaj bazaj principoj de laborado pri neoficialaj radikoj, por ekspliki kelkajn aferojn pri kiuj diversaj personoj atentigis min, kaj kiujn kritikis S-ro Roelofs en artikolo en S.R. 7, p. 24-25.

La tasko de leksikonisto estas konstati, ne proponi aŭ ordoni. Ĉu la leksikonisto opinias ke formoj trovitaj estas bonaj aŭ malbonaj, belaj aŭ nebelaj, saĝe elektitaj aŭ nesaĝe elektitaj, ĉio ĉi ne gravas. Lia tasko estas konstati la formojn uzitajn, ilin tabeligi, kaj utiligi laŭ la bezonoj. Tial, ĉu aŭ ne formoj en la listo ŝajnas al mi (aŭ iu alia) eraraj, malĝustaj, kc., ne rajtas influi la leksikoniston, kiu devas noti ĉiun formon. Pro tio, la kritiko de S-ro Roelofs pri „*Samaritan*, *impresionalism*, *impresionalist*, *kialici*, *hirugi*, *tanatologi*” ktp. estas mem erara. La formoj ne estas eraroj de mia listo, kiu nur konstatas trovitajn, uzitajn formojn.

Estas malfacile determini, kiam oni laboras pri neoficialaj radikoj, kiuj for-

moj estas radikoj kaj kiuj ne. Ĝenerale mi devis establi la principon, ke formo kiu ne estas dividebla en oficialajn radikojn, aŭ kiu ne estas dividebla en evidentajn neoficialajn radikojn devas opiniĝi radikoj. Krome, kiam divido en oficialajn radikojn donus nur nekomprenblan miksaĵon, mi opiniis ke necesas nomi la tuton unu radikoj. Tiel, *deport*, *bontempl*, *franciskan*, *internul* estas listitaj, kvankam (esc. ĉe *franciskano*) ĉiufoje kun demandosigno aŭ rimarkigo en la listo mem. Nomi ilin „eraroj” do ŝajnas iom strange al mi. Ĉu estas eraro enmeti formon kun atentigo ke ĝi eble estas nur kombinaĵo?

Kio estas propra nomo? Pri tio oni multe disputis kaj disputos. Tamen, S-ro Arjo (pli kutime konata per la formo Arius), kvara jarcento p.K., certe opinius sian nomon propra nomo, kaj opinius siajn adeptojn *arianoj* (aŭ *arjanoj* aŭ sim.). Estas la tradicia kutimo nomi *Kristano*, *Katoliko*, *Metodisto*, *Ariano* ..... propraj nomoj.

S-ro Roelofs sendube pravus pri *krisoleg* kaj eble pri *ariano* ke ili estas kombinaĵoj, kvankam mi atentigas ke la ĉilasta estas ankaŭ ofte uzata kun signifo ne facile derivebla el *ari-an*.

*Beletr* estas listita kiel radikoj, pri *bolŝev-*, *faŝ-*, *sad-* mi nur apelas al la etimologio kaj kutima internacia uzado.

Pli grave: laŭ P.V. *hurli* signifas ululi, kiu havas du donitajn signifojn „bleki strige”, „bleki lupe”. Denove, la fakto ke P.V. deziras ordonadi pri vortuzado ebligante nur la duan signifon ne ŝanĝas la efektivan uzatecon. Aliflanke, la atentigon pri la negrava skribareto „*fertil*” anst. „*fertile*” oni kompreneble agnoskas kiel validan.

La signoj <sup>e</sup> kaj <sup>\*</sup> estas enmetitaj laŭ listoj de S-ro Roelofs, kiu do respondecas pri eraroj tiurilate.

Multe pli ol ĉi tiuj polemikoj pri „eraroj” min ĝenas la lasta frazo de S-ro Roelofs, ĉar ĝi indikas tre eraran opinion pri la celo de la listo.

La celo de mia laborado estis fari science valoran liston de la radikoj neoficialaj uzataj plejmulte en nia lingvo. Ĝi ne celis esti listo de rekomendaĵoj, proponoj, kc. Probable tre granda parto de la radikoj listitaj ne meritas aperi en leksikono, pro sia malofteco.

Personoj kiuj verkas leksikonojn, lernolibrojn, kc., bezonas science starigitan liston de la efektive uzataj formoj atentindaj por la verkoj prilaborataj. Mia listo celis starigi liston de la neoficialaj radikoj por ebligi tiun elekton.

Ni ankoraŭ ne havas science preparitan leksikonon, leksikonon kiu, kiel la naciaj leksikonoj, konstatas la vortuzon kaj ĝin eksplikas. Tio ja estas grandparte pro la manko de taŭgaj esploroj pri la vortuzado, kaj ankaŭ pro la neĝustaj opinioj pri kion devas fari leksikono. Mi esperas ke mia laboro helpis forigi la unuan mankon, forigi la duan mankon povas fari nur la diversaj personoj mem.

**Respondo.** — Se mi bone komprenas, s-ro Broadribb havis duoblan